

Leterujo : 6-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 483, 1973.01.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andree Gacond.

En nia leterujo ni havas interesan raporton pri la blindula son-revuo *Amika Voĉo*, kies redaktoro estas sinjoro Giovan' Antonio Pellanda en Winterthur, Svislando.

A.- Tiu blindula son-revuo *Amika Voĉo* estas grand-parte nutrata de la esperanto-prelegoj de nia kurtunda servo de Svisa Radio. La registraĵo de ĉiuj niaj prelegoj estas senpage sendata al Svisa Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj por faciligi la eldonadon de tiu son-revuo.

Cl.- Jen kiel estas organizata kaj funkcias tiu neordinara revuo, kiu alportas ĝojon al centoj da blindaj esperantistoj :

A.- *Amika Voĉo* estas en sia naŭa jarkolekto. Jen proksimume kiel prezentiĝas tiu revuo. Post la titolo estas prezentataj novaĵoj konceme la esperantan vivon. Poste sekvas tri prelegoj kaj fine muziko : klasikaĵo, orkestra muziko, pianludo aŭ kantoj, kelkfoje kantataj en esperanto fare de niaj intemaciaj artistoj. Sur la dua trako estas surbendigitaj kvar prelegoj, kiuj ĉefe rilatas al svisaj temoj. Konkludas la revuon anoncetoj aŭ similaĵoj.

Cl.- La daŭro de la aŭskultado de tiu son-revuo estas proksimume unuhora. Ĝi estas registrata je la rapido de po 9 metroj komo 5 je sekundo, ĉar tio estas la ĝenerale plej uzata rapido.

A.- Ĉar Svisa Radio senpage disponigas la registraĵojn kaj ĉar Svisa Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj ricevas subvenciojn de diversaj blindulaj organizaĵoj, precipe de Svisa Centra Unuiĝo por la Bono de la Blindularo, kies sidejo estas en la urbo Sankt-Gallen, tiu son-revuo estas senpage ricevebla de la esperantistaj blinduloj.

Cl.- *Amika Voĉo* estas nun ricevata de blinduloj en 17 landoj : Britio, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Germanio okcidenta, Finnlando, Francio, Hispanio, Danlando, Italio, Jugoslavio, Norvegio, Pollando, Rumanio, Svedio, Svislando, Sovetio kaj Usono.

A.- Tiuj sonbendoj estas forsendataj en la originala plasta skatolo, kiu estas metita en duoblan kartonan ujon. La intema flanko entenas la adresajn slipojn. La ekstera flanko havas fenestreton, kie estas fiksitaj la adres-slipoj. Por ke la blinduloj povu mem ordigi la resend-skatolojn, sur ĉiu adres-slipo troviĝas indikoj en normala skribo kaj en brajla skribo.

Cl.- Ekzistas feliĉe intemacia konvencio subskribita de la landoj, kiuj aliĝis al Universala Poŝtasocio. Ĉiuj sendaĵoj por la blinduloj estas senpagaj, ĉu temas pri leteroj en blindulskribo, pri sonbendoj aŭ aliaj aferoj. Ne estas imageble, kio okazus, se ne estus tiel, ĉar la brajla skribo bezonas multe da fortika papero.

A.- Ekzemple la romano *La Mizeruloj* de la franca verkisto Victor Hugo ampleksas en la brajla skribo 42 volumojn, la *Enciklopedio Duden* 18 volumojn. Vi povas imagi la pezon de tiuj volumoj en kilogramoj, konkludas nia korespondanto.

Cl.- La poŝtoфіcejoj havas kontrolon pri la blinduloj, kiuj profitas pri la senpaga sendado da korespondaĵoj.

A.- Sed ni revenu al la son-revuo *Amika Voĉo*. Sinjoro Pellanda ne scias, kiom da aŭskultantoj ĝin ricevas, ĉar en multaj landoj ĝi estas kolektive aŭskultata de rondoj kaj rondetoj. Sinjoro Pellanda sendas al ĉiu lando po unu kopion. En la lando mem oni poste okupiĝas pri la dissendado de tiu kopio kaj pri la necesaj multobligoj de tiu kopio.

Cl.- Konklude al tiu informado pri la blindula son-revuo *Amika Voĉo* ni kuraĝigas niajn blindajn aŭskultantojn, kiuj posedas registrilon, ekrilati kun sinjoro Giovan'Antonio Pellanda en Winterthur, petante la ricevadon de tiu revuo. Ni faros la neceson por transsendi leterojn, kiuj alvenus al nia Esperanto-fako ĉe Svisa Radio, kaj kiuj estus adresataj al tiu son-revuo *Amika Voĉo*.

A.- Restas al ni minuto por doni vivsignon al skribemaj geaŭdantoj. En Nederlando ni salutas sinjoron Bakker en Amsterdam. Li sendis bildbroŝuron, kiu parolas de si mem favore al Esperanto. Dronanto ekzemple kaptas sav-buon nomatan Esperanto dum la ondoj surhavas la plej diversajn lingvo-nomojn. Bona ideo por afiŝo !

Cl.- Ĉiam en Nederlando ni salutas fraŭlinon Wipkje Steffering en Leeuwarden, sinjoron Gerard van der Horst en Hago, sinjorinon H. Zwaanswijk-Dik en Alkmaar. Ŝia bildkarto pri la publika ĝardeno kun la vortoj *Estu bonvenaj* estis transsendita al la publika biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds por la esperanto-arkivejo.

A.- En Norvegio ni salutas plurajn geaŭdantojn en Oslo : sinjoron Rolf Bugger-Paŭlsen, sinjoron Kjell Gustavsen, sinjoron L. Kulish, sinjorinon Tamiko Kaŭakami, sinjoron Tharald Dybing, sinjoron Ame W. Aasland, gesinjorojn Agnete kaj Ludvig Anjer, sinjoron Prytz kaj sinjoron John Berggreen.

Cl.- Nia plej fora aŭdanto loĝas en la insulo Nov-Zelando en Oceanio. Li nomiĝas sinjoro Vere J. Williams kaj loĝas en la urbo Palmerston North. Li aŭdas nin dank'al longa anteno, kiu laŭiras la tegmenton de lia domo. Bedaŭrinde la aŭtomobiloj kelkfoje fuŝas la aŭdadon. Ni esperas, ke ili ne ĵus fuŝis nian salutadon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andree Gacond. Ĝis reaŭdo!